

お仏壇の意味

Signifo de Budha Altaro

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

ある仏壇屋さんが実施したアンケートによれば、お仏壇をもっている世帯の割合は約4割でした（単身者世帯を除く）。一戸建持ち家住宅の場合は5割を少し上回りますが、マンションなどの集合住宅の場合は2割くらいです。昨今の住宅事情からして、置き場所が無い、ということもあるのですが、それにしても、お仏壇をもつ必要性を感じない人がとても多いことに驚きました。若年者世帯ほど仏壇の保有率は低くなるだろうことは容易に察せられます。お仏壇を見たことがない子どもたちも大勢いるのではないのでしょうか。ということは、合掌礼拝したことがない子どもが大勢いる、ということです。

ある女性年配者がかつて、とても印象的なことをおっしゃっていました。

「お仏壇のない家は犬小屋とおなじ」
そう言って、ご自分のお子さんが結婚して独立した時に、小さめのお仏壇を購入してプレゼントしたそうです。

私たち人間には、物質生活と同時に精神生活があります。食べて寝てくつろいで、という生活のために台所や寝室や居間があります。とすれば精神生活、その中でも宗教的な精神生活を象徴するのがお仏壇だと思います。

Iu vendisto de Budha altaro enketis pri proporcio de hejmoj, kiuj posedas Budhan altaron. Estis ĉirkaŭ 40% (ekskludas unumembran hejmon). En la kazo de hejmo loĝanta en propra domo, iom pli ol duono; sed en la kazo de apartamenta hejmo, ĉirkaŭ 20%. Lastatempa situacio de loĝejo eble ne disponas lokon por meti Budhan altaron. Sed estas surprize, ke multaj homoj ne sentas neceson por havi ĝin. Tute facile oni povus supozi, ke hejmo de juna generacio des malpli posedas ĝin. Verŝajne multaj infanoj ĝis nun neniam vidis Budhan altaron. Tio signifas, ke multaj infanoj neniam kunmetis la manojn por adori.

Iu maljunulino iam diris tion kio tre impresis min: "Domo sen Budha altaro estas sama kiel hundbudeto." Kaj ŝi aĉetis malgrandan Budhan altaron por donaci al sia filo, kiam li edziĝis kaj sendependiĝis.

Ni homoj havas ne nur materian sed spiritan vivon. Por materia vivo de manĝo, dormo kaj ripozo estas kuirejo, dormoĉambro kaj loĝoĉambro. Dume spiritan vivon, interalie religian vivon simbolas Budha altaro, mi pensas.

ところが多くの方は次のようにおっしゃいます。「うちはまだ死んだ人がいないから仏壇はまだ必要ない」

これは、お仏壇を死者を祀るための道具とみなしているのです。そうではありません。お仏壇の中心はご本尊（宗派によって釈迦仏だったり阿彌陀如来であったり大日如来であったり、さまざまですが）です。ご本尊を拝むのに、お葬式を経験したかどうかは関係のない事柄です。（もちろん死を機縁として仏教に関心をもつことがあるにしても。）したがって、お仏壇をご先祖さまの家、とみなす発想もおかしいのです。これは死者をホトケと呼ぶ日本独特の風習に由来しているのだと思いますが、仏とは覚者のことであるという原点に立ち返る必要があるでしょう。

また、次のように言われる方もいます。「実家に仏壇があっつていずれ相続するのだから別に買う必要はない。」

既に述べたように、仏壇は一家の精神生活の中心になるものです。実家に台所があるから自分の家に台所が必要ないのでしょうか。実家と同じように大きなサイズのお仏壇を買う必要はありません。小さなサイズでけっこうです。要は、毎日合掌礼拝する場を設定することが大切なのです。

お仏壇はお寺の内陣をミニチュア化したものだといわれます。あるキリスト教徒が日本人家庭にホームステイした時、お仏壇を見て、「すてき、お家に礼拝堂があるなんて」と感心したそうです。

Sed multaj homoj diras, "Ĉe ni ankoraŭ neniu mortis, ni ne bezonas Budhan altaron."

Ili rigardas Budhan altaron kiel ilon por kulti mortintojn. Sed ne. La centro de Budha altaro estas Budho (ĉu Ŝakjamunio, ĉu Amitabo, ĉu Vajroĉano, aŭ aliaj; tio dependas de skolo.) Adori la centran Budhon kaj sperti funebran ceremonion estas inter si tute senrilataj aferoj. (Kompreneble povas esti, ke iuj ekhavas intereson pri budhismo motivite de homa morto.) Tial ankaŭ estas strange, ke rigardi Budhan altaron kiel domon de prapatroj. Tiu ĉi rigardo probable devenis de la japana unika kutimo nomi mortintojn *hotoke* (budho). Sed ni devas retroiri al la origino, ke Budho estas vervekiĝinto.

Aliaj diras, "En la domo de miaj gepatroj troviĝas Budha altaro. Ĝin mi iam heredos, tial mi ne bezonas aĉeti mian propran."

Kiel mi jam diris, Budha altaro estas la centro de spirita vivo en hejmo. Ĉu oni ne bezonas sian propran kuirejon, se la domo de viaj gepatroj jam havas kuirejon? Oni ne nepre bezonas aĉeti grandan Budhan altaron. Malgranda sufiĉas. Grave estas havi la spacon, kie vi ĉiutage adoras.

Budha altaro estas miniaturo de centra altaro de templo. Mi aŭdis, ke iu kristano, kiam li vizitis japanan hejmon, estis impresita de tiea Budha altaro kaj laŭdis. "Ho, vi havas kapelon en via domo!"

そうです、どんなに小さくとも、それは礼拝堂とっていいのです。よく観察してみてください。中央の高い位置にご本尊がましまして、その前に香炉と燭台と華瓶があり、その他の仏具が並んでいます。この並び方には規則があり、それはお寺の仏具の並び方を手本としています。

ときどき、仏具の並び方がぐちゃぐちゃになっているお宅があります。

「形式はいつでもいい、大切なのはお参りすることだから」とは思いません。形式の乱れは心の乱れです。

おかしい話ですが、「線香を焚くと煙で汚れる」「ろうソクを灯すと煤で汚れる」といって嫌う人がいます。よほど高価なお仏壇なのでしょうか。しかしお仏壇は単なる家具、インテリアの一つではありません。大切にしたい気持ちは貴いですが、本末転倒になってはいけません。購入してずいぶん年が経っているのに煤一つないお仏壇を見ると、「ああ全然お参りしてないな」と分かります。煤けたお仏壇には風格があります。

家族そろって日常にお仏壇に（より正確にはご本尊に）お参りする習慣を身につけたいものです。



Jes, kiom ajn malgranda, Budha altaro estas kapelo. Bone observu ĝin. En la centra alta loko sidas aŭ staras Budha statuo, kaj iom antaŭe troviĝas incensujo, kandelingo, florvazo kaj aliaj ritinstrumentoj. Ili devas aranĝitaj laŭ certa maniero, kies modelo estas tiu de templo.

Foje mi vidas Budhana altaron, kie diversaj instrumentoj estas metitaj malorde. Mi ne pensas, "Grava estas adorado, tial formo ne gravas." Malordo de formo atestas malordon de koro.

Kaj foje mi renkontas strangajn homojn, kiuj ne volas bruligi incenson nek kandelon, dirante ke fumo de incenso kaj fulgo de kandelo malpurigas Budhan altaron. Ĉu tiom multekosta altaro? Mi komprenas, ke ili eble volas teni ĝin bela, sed ili jugas bovon malantaŭ la plugilo. Kiam mi vidas Budhana altaron sufiĉe malnovan sed belan, mi ekscias, ke la posedanto ne kutimas adori antaŭ ĝi. Malnova kaj fulgokovrita Budha altaro havas noblecon.

Kun ĉiuj familianoj ĉiutage adori antaŭ Budha altaro, precize dirite antaŭ Budho; tiu ĉi kutimo tre gravas.